Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6 Junio, 2011

*Kara Leganto, Jen vi legas la junian numeron de nia bulteno, kiu aperas sekvanttage post la maja. En ĝi – informo pri la pikniko, resumo de maja prelego de s-no M. Shafroth, interesaj E-novaĵoj.* –La Redakcio

***E-pikniko***: *Okazos dimanĉe, la 26an de Junio en la tradicia loko: arbara rezervejo de Franklin-a parko (norda flanko de Irving Park Avenuo kaj okcidenta – de Cumberland Avenuo), de tagmezo – ĝis vespero. Veturigontoj per punlika transporto bv iri al la plej lasta okcidenta heltejo de Irving Parka buslinio n-ro 80. Telefonu al Viktoro: (773) 344-2276.*

# Kio Okazis en Viskonsino?

Dekomence – iom da historio. Sur la foto vi povas vidi la unuan guberniestron de Viskonsino, elektita antaw cent jaroj – Francis McGovern, kaj la nunan – Scott Walker. Ambaŭ estis unue respublikanoj, sed ili malamegas kaj Francis McGovern iĝis demokrato dum la tempo de FDR.


Francis McGovern


Scott Walker

Ekzistas tri-kvar ŝangpunktoj en la politika historio de Viskonsino. La una estas la kreo de la Respublikana partio en 1854. Tuj post tio la partio iĝis la plej potenca politika forto en Viskonsino. En tiu periodo la respublikana regno daŭris ĝis FDR, tiam luktis progresema kun malprogresema flanko ene de la Respublikana partio, ekzistis ankaŭ la Socialista partio, sed kun la ekonomia disfalo venis FDR kaj la demokratoj ekesti pli potencaj en la ŝtato. Progresemaj respublikanoj kiel Francis McGovern kaj socialistoj kiel Daniel Hoan aliĝis al demokratoj. Tamen la regno de respublikanoj daŭris ĝis guberniestro Gaylord Nelson.

Do, la politika historio de Viskonino estas plejparte respublikana, sed ĉu Viskonsino estas malprogresema ŝtato? Mi kredas, ke ne: ĝi multe ŝanĝis tra la jaroj. Iam granda kvanto da la loĝantaro ne naskiĝis en Usono kaj tiu multe influis la politikon de la ŝtato. En Viskonsino loĝis multaj eŭropanoj, inklinaj al socialismo, pro la noveco de la ŝtato ĝia loantaro ŝatis "freŝajn" ideojn, kiujn propopnis respublikanoj: al riĉuloj, farmistoj kaj laboristoj; al katolikoj kaj luteranoj; al tiuj, kiuj kontraŭis alkoholon kaj uzantoj ĝin; al parolantoj de la angla kaj de la germana.

Milvaŭkio eĉ elektis socialistajn urbestrojn inter la jaroj 1910 kaj 1960. Fakte, Milvaŭkio (la plej granda urbo) kaj Madisono (ĉefurbo) tre forte influis la politikon de Viskonsino: malkreskis influo de eŭropecaj ideoj kaj kreskij influo de universitate edukitaj homoj.

En 1905 aperis leĝo pri la registaraj laboristoj: ili ne plu estu dungataj pro politikaj kialoj, sed pro iliaj kapablecoj. Philip La Follette (guberniestro de 1934) alvenigis multajn plibonigojn por la laboristoj: en 1935 estis fondita sindikato de la registaraj laboristoj AFSCME; en 1937 estis enkondukita la Viskonsina leĝo pri la laborrilatoj. En 1939 Viskonsino fariĝis la tria plej sindikateca tato de Usono. En 1959 la sindikato de la registaralaboristoj ricevis la rajton negoci por la registaralaboristoj.


En 1964 kantonoj de Waukesha, Washington kaj Ozaukee, antaŭurboj de Milvaŭkio, lastfoje voĉdonis pro la demokrata prezidanta kandidato. En 1994 la respublikanoj rekonkeris la asmebleon. Ĉu la Ŝanĝoj en Viskonsino okazis nur pro kialoj kiuj rilatas a Viskonsino? Ne. En Usono kaj en la mondo estis multaj ŝanĝoj, kiuj forte influis Viskonsinon. En 1980 alvenis respublikana presidento Ronald Reagan kaj en 1981 li venkis la sindikaton PATCO, kiu estis la sindikato de la flughavenaaviadilgvidistoj. En 1996 estis fondita la konservativa Fox News.

Do, hodiaŭ ekzistas tre forta merkato kiu favoras konsumantojn kaj malfavoras laboristaron. Plue ekzistas komunikil-imperioj kiel tiu de Murdoch subtenantaj konservativojn. Ankaŭ konservativaj intelektuloj kiel Ayn Rand estas ŝatataj hodiaŭ. Do la voĉdonantoj ne estas feliĉaj. La fido al usona registaro falis kaj la demokratoj politikistoj estas tre ofte venkitaj. Oni elektis Scott Walker en Viskonsino. Kion li faris? Li komencis la eliminadon de sindikatoj. Ĉi tio estis granda ŝoko por tiuj, kiuj pripensis la historio de Viskonsino. Ĉu Scott Walker sukcesos? Ni rigardu la detalojn de tio, kio okazis ekde 2010 kaj poste vi mem povas prognozi.

Walker prezentis (11.02.2011) sian leĝprojekton kontraŭ la sindikatoj. La 15an de Februaro pli ol mil civitanoj enviciĝis por esprimi siajn opiniojn pri la leĝprojekto. La okupado de la kapitolo komenciĝis. La 16an de Februaro la publiklernejaj instruistoj de Madisono komencis neoficialan strikon. La 17an la demokratoj senatanoj forlasis Viskonsinon. La 19an 68.000 homoj marŝis ĉirkaŭ la kapitolo por protesti la legxprojekton. Sed la 22an la striko de la instruistoj finis. La 23an Walker paroladis per telefonono kun iu "David Koch". Ili multe interkonsentis. La 24an la asembleo akceptis la leĝprojekton de Walker, sed multaj demokratoj ne ekĝuis la ŝancon kritiki ĝin. La

25an 70.000 marŝis ĉe kapitolo. La 18an Walker komencis malebligi la okupadon de la kapitolo. La 9an de Marto Fitzgerald “forigis la financajn aspektojn” de la leĝprojekto kaj ĝi estis aprobita de la senato. La 12an de Marto la nombro de marŝantoj atingis 100.000. La 18an la juĝisto Maryann Sumi malpermesis la efikigon de la leĝo, ĉar i versajne ne estis akceptita laŭleĝe.

Historie ekzistas mallongdaŭraj politikaj ŝangoj kaj logdaŭraj tendencaj. La ekonomia konjunkturo estas mallongdaŭra. Demografiaj ŝanĝoj kaj paradigmaj ŝanĝoj estas longdaŭraj. Similas al ondoj kaj la tajdo. Kiam tajdo supreniras, sablkastelo estas en danĝero, sed finfine iu ondo detruas ĝin. Same en Usono pli kaj pli da la loĝantoj vivas en suburboj. La tajdo de libera merkato kreskas. La ondo de malbona konjukturo jam forpuŝis respublikanojn. Ĉu ĝi nun forpuŝas demokratojn kaj kiu forpuŝo estos pli longdaŭra?




Ĉu tio, kio okazis en Viskonsino estas surpriza? Ĉu vi mem povas respondi? Kio okazos en 2012? Tion vi mem povas prognozi (Aldone diagramo de fido al prezidentoj). *–Marko Shafroth*

## Edukado.net: Daŭre Kreskas kaj Pliboniĝas!

Edukado.net – porinstruista paĝaro www.edukado.net, kreita kaj daŭre subtenata de Esperantic Studies Foundation (ESF), informis, ke ĵaŭdon, la 9-an de junio 2011, ĝi denove ekhavis 2000 registritajn membrojn: “Mi skribas denove, ĉar tiun nombron ni atingis jam antaŭ pli ol unu jaro, sed pro la ĉi-januara purigado kaj forigo de la delonge neuzitaj kontoj ni perdis ĉ. 500 membrojn. Nun ni denove estas dumilope, kio en si mem estas bela kvanto. Bravo al ni ĉiuj”, skribas la redaktoro de la retejo, Katalin Kováts. La retejo estis plene rekonstruita fine de la pasinta jaro, riĉiĝinte, interalie, per novaj iloj, mapoj kaj kolektoj (ekzemple, de diplomlaboraĵoj pri esperantologio aŭ interlingvistiko). Tiu rekonstruo okazis dank’ al la subteno de la uzantoj.

Alia grava novaĵo estas, ke Edukado.net antaŭnelonge lanĉis RITE-n (Retan Instruistan Trejnadon). La kurson kreis, financis kaj estros d-rino Katalin Kováts, kaj en la projekto kunlaboras la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj instruistoj de la Esperantologia Fako de Universiato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. Al la kurso jam aliĝis kaj ekstudis 15 personoj (el Belgio, Francio, Greklando, Aŭstralio, Nov-Kaledonio, Usono, Vjetnamio, Svislando, Portugalio kaj Britio). Studi en RITE ĉiu povas laŭ siaj ritmo kaj ebloj, en ajna tempo de la jaro. La antaŭvidita studtempo, kun kelkaj studhoroj ĉiusemajne, estas proksimume unu jaro. *–ESF*

## La Riverego Junia Jam Aperis

E-revuo “La Riverego” eldonata en Kebekio (Kanado) kaj redaktata de Ĵenja AMIS, en sia somera numero aperigis kolektivan tradukon de Tony Beckwith “Arto en traduko”, faritan fare de membroj de nia E-societo. Interesa legaĵo!

### Adreso:


Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org


### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Junio – Tradicia Pikniko

26an de Julio – Rezultoj de IJK; naskiĝtago de Esperanto

23an de Aŭgusto – la UK en Kopenhago, speciala raporto de niaj membroj kaj amikoj